Mi ŝatas tiun filmon: ni vidas tre belajn ĉevalfotojn, veran rilaton inter du herooj (unu, kamparano, la alia, urbanino). Estas ne artefarita historio, ne granda filmo sed bela kaj interesa.

Hubert

FORPASOJ de Gabriel Le Quéré kaj Pierre Le Vern

Gabriel Quéré forpasis en julio 2015.

La bretona federacio kaj esperanto movado ĝenerale, perdas ege valoran esperantiston kaj amikon. Gabriel Quéré lernis esperanton kun Marthe Poher en Plougastel-Daoulas kaj post ŝia forpaso decidis krei grupon en Landerneau. Li estis fervora esperantisto kaj ankaŭ artisto. Plurfoje li espoziciis siajn fotoĵojn eksterlande, precipe en Rusio. Li volis kunigi siajn du pasiojn kaj tiel instruis al gejunuloj fotadon kaj esperanton samtempe. Ĉiam li estis volontulo por akcepti esperantistajn eksterlandanojn kaj estis tre scivolema pri ilia kulturo. Ni perdas elstaran esperantiston kaj varmkoran amikon.

Pierre Le Vern, responsulo de la esperanto asocio en Quimper, forpasis la 31an de aŭgusto 2015.

Li lernis Esperanton ekde 1995, unue koresponde kaj poste en la fervojista esperanto asocio en Quimper. En 2002 li prenis la postenon kiel gvidanto de la fervojista esperanto grupo en Quimper. Tre dinamika kaj aktiva esperanto-instruisto, li senĉese reklamis kaj varbis. Li multfoje partoprenis en staĝoj (ekz. en Vannes, Plueze-ko, Greziljono...) kaj en kongresoj, ĉefe fervojistaj, kvankam li ne estis fervojisto sed eks instruisto en IUT. En 2014 li sukcese trapasis la ekzamenon C1.

Josette Ducloyer

La UK Lille 2015 de Christophe

Impresoj de unuafojon kongresinto



Antaŭ la kongreso, mi bedaŭris ke ne troveblis multe da klaraj informoj pri la programo. Nur la lastan tagon antaŭ la foriro

(la 24-an de Julio), mi trovis kiu estas tiu "IKU", kiu estis menciita plurfoje en la programo. Kompreneble, tamen mi ĉeestis je la informsesion por unuafojaj kongresanoj. Mi spertas kelkajn malfacilaĵojn por sekvi la prezentanton: li iom rapide parolas kaj ne lasas tempon, por trovi pri kio li parolas, aŭ paperojn en la kongressako aŭ paĝojn en la kongresa libro. Vidante ke la eventoj okazas en ĉambroj/salonoj situantaj en ĉirkaŭ 8 etaĝoj kaj ne vidinte liftojn, mi timetas ke... Sed niveloj ne estas veraj etaĝoj kaj la afero ne estas tiom sporta kiam mi timetis.

Vidante la programon, klaregas ke ne eblas spekti ĉiujn ŝajnajn interasaĵojn. Mi rimarkas ke foje estas diferenco je 15 minutoj inter la du diversaj formoj de la programo. Kvankam la "Grand-Palais" ja estas granda, kelkaj prelegoj okazas en alia konstruaĵo, ne malfacile trovebla, sed piedire kaj ne kure, necesas 15 minutoj por iri de unu al la alia. Jen ankoraŭ unu afero kiu malhelpas ĉeesti kelkajn dezirataĵojn. Mia programo por la unuaj tagoj (dimanĉo ĝis mardo) estas plenigita. Ankaŭ aŭskulti esperanton la tutan tagon iomete pli laciĝas ol mi opiniis.

Bonvenas la merkreda ripozo.

Mi tute kontentas pri sciencaj prelegoj de IKU.

Mi ŝatis la videan kurson de Amri Wandel surbendigita en 2012. Do kiam mi leksciis ke li gvi-

dos kurson pri Relativeco en Lille, mi opiniis ke mi devas ĉeesti tion. Kvankam mi jam sciis pri tiu temo, mi ŝatis lian prezentadmanieron.

Malmirinde, malpli interesas min prelegoj pri artoj.

Teatraĵoj estis ege dezirataj. Almenaŭ 2 fojojn, tiom multe da homoj atendis 15 aŭ eĉ 30 minutojn antaŭ la komenco, klaras ke ne utilas provi eniri. Pro tiu "furora sukceso" (citante la kongresan kurieron), unu el la teatraĵoj estis ludata unu plian fojon. Okazis ankaŭ koncertoj, kelkaj oficialaj en rezervitaj salonoj, kelkaj ne oficialaj en la halo. La muziko foje agrablas, sed ofte malfacilas kompreni la tekstojn de la kantoj kiam almenaŭ 2 homoj samtempe kantas. (La duopo Kajto sukcesas tion, aŭdeblas ke ili estas profesiuloj, kvankam verŝajne helpas la diferenco inter la 2 voĉoj.).

Ankaŭ prelegis André Cherpillod. Fine de sia prelego, li tuŝis 2 temojn pri kiuj mi juĝis lin troigema kaj ke li malpravas. Laŭ li, la fakto ke Zamenhof inventis la h-sistemon por kodi la nelatinajn literojn kaj ke la akademio aprobis la x-sistemon estas valida kialo de malamo kontraŭ la akademianoj. Kvankam estas konata ke la h-sistemo foje kreas ambiguaĵojn, kiuj ne eblas per la x-sistemo ĝuste ĉar la 'x' litero, kiel la sola akcento ^, ne estas parto de la vortprovizo. Li ankaŭ malpravas kiam li parolis pri la "netuŝebleco" de la Fundamento, ĉar li malprave subkomprenas ke la Fundamento estas sufiĉe plena por ke decideblas pri iu ajn asertaĵo se ĝi konformiĝas al la Fundamento. Lingvostudadoj montris ke neniu gramatiko estas logike plena.

Christophe el Rennes

La UK Lille 2015 de Josette



Ni decidis veturi al la UK laŭ la marbordo, malgraŭ la vetero iom aĉa... Sed pluvo ne estas problemo por ni, ĉar ĉie ni kunportas nian dometon: ni havas etan domveturilon...

Nia unua haltejo estas la ĉarma haveneto Honfleur, kie ni spertas kelkajn aventurojn : falo en teleron de unu vitro el okulvitroj, forgeso de ĉiutagaj kuraciloj, gaspaneo, aĉetado de krabo tro granda por la kaserolo... Sed ĉiufoje ni renkontas simpatiajn homojn, kiuj helpas al ni!

Ni ĝuas la klifojn de Etretat, la rulŝtonetojn de la nordaj plaĝoj, la birdojn en la golfo de la Somme, kaj finfine alvenas al la kongresejo en la centro de Lille, kie ni eltiras el la fundo de la domveturilo la panelojn de la ekspozicio pri « Esperanto dum la unua mondmilito ». Multaj homoj jam estas pretigantaj la halon por la akcepto de la kongresanoj, kiuj alvenos la morgaŭon. Ni starigas niajn panelojn en alloga loko kaj forlasas la geamikojn por veturi al ĝardeneto de esperantisto, kiu bonvolas ke ni tie parkumu nian domveturilon. Vespere kun li ni vizitas la infankongresejon antaŭ ol englutiĝi la morgaŭon en la enorman Grandan Palacon, kie senĉese alvenas miloj da kongresanoj. Jean-Pierre deĵoras en la akceptejo kaj mi en la informejo. Venas al ni diversaj demandoj pri la urbo, kiun ni ne konas, pri la loko mem, kies meandroj estas por ni misteraj, pri...pri... Ni respondas kiel ni povas, studante la mapojn, montrante kiel oni uzu la kongreslibron, kie kaŝas sin la lifto aŭ la necesejo aŭ la prelegĉambregoj ...

2683 partoprenantoj el 82 landoj babilas en la brua halo. Dum la movada foiro 120 budoj de esperantaj asocioj reklamas en vigla ĥaoso. Ĉiutage dekoj da prelegoj, teatraĵoj, koncertoj, ofertas belegan montrilon al Esperanto, ne nur « inter ni » sed ankaŭ, por kelkaj, al la ekstera publiko. Aparte neforgesebla estas la spektaklo de la Kompanoj « Brel inter la gigantoj. » Ni ĉeestas prelegojn, plezure renkontas geamikojn el la tuta mondo, kiuj iufoje vizitis nin en Bretonio, aŭ konatiĝas kun novaj. Kvindeko da Bretonoj partoprenas la kongreson kaj eĉ Jean-Pierre prelegas pri Bretonio, do multaj eksterlandaj esperantistoj aŭdas pri nia regiono kaj kelkaj decidis profiti la okazon por viziti ĝin post la kongreso.

Tuj post la kongreso, ni vizitas la militan « kvadraton » en la tombejo de Arras. Dank'al lokaj esperantistoj, Jean-Pierre, la unua el la familio, malkovras tie la tombon de sia avo, mortinta antaŭ pli ol cent jaroj. Emociplena momento...

Post densa kaj neforgesebla semajno, ni rehejmiĝas tra normandaj vilaĝoj, kiel la eta Camembert, kiu aparte plaĉas al ni, ne nur pro sia fromaĝo...

Okazis, okazos (turneo 2016)...

ALEKSANDRO MELNIKOV

Rondvojaĝos tra Bretonio en printempo 2016

Aleksandro rondvojaĝos inter la 23a de februaro kaj la 24a de marto 2016

Jen lia viv-resumo

Li naskiĝis 1951.08.08, ruso, diplomigis en universitato (kemia fakultato) kaj fremdlingvo-instruista supera lernejo (angla lingvo), **doktoriĝis** pri la teorio de lingvoscienco (1990), **habilit(aci)igis** pri kompara lingvistiko (2004). En 2013 elektiĝis kiel **membro de la**



Akademio de Esperanto.

Laboris diverstempe kiel instruisto pri fiziko, kemio, biologio, angla lingvo kaj Esperanto ĉe faka mezlernejo kaj superaj lernejoj, dum pluraj jaroj salajrata prezidanto de la Rostova E-klubo. En 2006-2012 – profesoro kaj la estro de la fremdlingva katedro ĉe la Rostova Akademio de Agrikultura Maŝinkonstruado, kiu poste fariĝis parto de la Dona Ŝtata Teknika Universitato, poste samloke t. n. supera scienca kunlaboranto (scienca esploristo). Ekde 2013 emerito. Distingita per Honorfolio de la Rusia ministerio pri scienco kaj edukado (2007). Laŭreato de akad. Paul Ariste-premio (pro interlingvistikaj meritoj, 2009).

Esperantistiĝis en 1965. Multjara aktivulo en naciaj kaj internaciaj asocioj. “Rusia esperantisto de la jaro”-2004. La filino estas denaska esperantistino, premiito de E-poeziaj konkursoj “Liro” kaj Belartaj Konkursoj.

(Kun)verkis dekon da libroj kaj centon da artikoloj en la rusa kaj Eo: sciencaj, popularigaj, instruaj libroj kaj broŝuroj (Esperant-lingve kaj ruslingve)

Ekde 1968 gvidis nacie kaj internacie diversajn E-kursojn (ekde 1986 laŭ la propra metodo "Instruado-sen-turmentado!")

Prelegis en dudeko da landoj de 4 kontinentoj pri diversaj temoj:

1. Kiel «artefarita» lingvo «naturan kvazaŭetnon» kreis (pri tio, kio similigas la E-istaron al etno)
2. Nigro-Blanko-Ĉielarko (La Ukrainia krizo vide el Rusio, Ukrainio kaj Okcidento).
3. Eĉ esperantistoj kapablas ŝerci (pri vortludoj en Esperanto).
4. Kiel instrui tedaĵojn distre (el ŝparporketo de E-instruisto)?
5. Lingva reflektiĝo de la specifa E-kulturo en la E-publicistikato.
6. «Mi serĉis novon kaj diverson...» - miaj (fi) aventuroj en la mondo dum E-vojaĝoj;
7. «Pejzaĝo en grizo kun E-istoj misloke» (E-movado en Rusio: spegubildo de la socia vivo).
8. Rostov-na-Donu bilde kaj komente (kiel hologramo de la vivo en Rusio).

ALTERNATIBA RONDIRO



La 20an de aŭgusto la tandema rondiro Alternatiba haltis en Saint Briac (35).

Alternatiba vilaĝo estas loko, en kiu oni prezentas diversajn alternativojn, kiuj ŝanĝos niajn vivmanierojn por protekti nian vivlokon, la planedon Tero.

Ni opinias ke nia lingvo ebligas homojn samnivele interŝanĝi sen supereco al alia. Do ni proponis esperanton al la komitato, kiu preparis la eventon.

Ni starigis esperantan budon en la Alternatiba vilaĝo kaj petis ke la masto por indiki la diversajn temojn kaj polusojn estu dulingve.

En la Alternatiba vilaĝo, ni renkontis multajn homojn interesitajn pri la lingvo eĉ kelkajn, kiuj ne fidis ĝin sed deziras interŝanĝi. Pluraj petis lerni la lingvon kaj demandis kluban adreson proksime al siaj urboj. Memoru ke Saint Briac estas laŭ la marbordo kaj aŭguste daŭre promenis multaj feriantoj.

Post tiu evento, ni starigas esperantan kurson proksime de la maro.

Philippe Stride

Agado de niaj klubanoj

ESPERANTO PLUS, ĈU VI KONAS?

Ni bezonas vian monhelpon por Jeremie Kahindo Jacques, kiu agadas por disvastigi esperanton en la Suda Kivuo, Demokrata Respubliko Kongo.

Nun ni estas 9 helpi lin do Armor Esperanto, kiu plie sendas filman materialon.

Vi povos dedukti parton de tiu sumo el via imposto, por tio vi devu sendi la monon al Guy Martin, kasisto de SAT-Amikaro, 6 rue du clos Margat 17000 La Rochelle; kasisto@sat-amikaro.org; indikante kialon. Se ne uzu la indikatojn malsupre.

LA FONTO DE ESPERANTO PLUS

Karaj samideanoj,

Nia komuna ligo estas nia bela lingvo Esperanto, ĉu ne ?

Same kiel ni, vi certe renkontis mirindajn esperantistojn en «*elmergiĝantaj*» landoj kiuj tute simple ne povas dediĉi sin al Esperanto pro manko de... ĉio (laboro, mono, manĝo...).

Ni renkontis unu, du, tri... Tial ni decidis krei ilon, kiu ne estas simpla helpo, sed digna kaj deca rekono de la kompetenteco de iu sperta esperantisto...

Ĝi malfermas sur kunlaboradon inter homoj (ĝis nun en Eŭropo) kiuj konsentas dekkvinope kunigi 10 € monate por subteni tiun esperantiston.

Tiel profesiigita, la esperanta vigliganto gajnas pri legitimeco vidalvide de siaj subtenantoj, komfortita en sia rolo, li povas plenplene dediĉi sian energion al disvastigo de Esperanto. Ĉar temas pri ia interŝanĝo, la kandidato promesas skribi monatraporton pri sia agado al ĉiuj anoj de sia grupo, kaj trimestre eldonas ĵurnalon pri la esperanta movado en sia lando. La reto ebligas rapidan kaj riĉan interŝanĝon inter ĉiuj aktoroj de la projekto kaj tiel vigligas la rilatojn.

Esperanto Plus lumigas la socian rolon de Esperanto.

Esperanto Plus vivigas Esperanton.

La projekto ESPERANTO PLUS

rekte kongruas kun la interna ideo de egaleco kaj solidareco en la homaro

KIAL ?

por subteni spertajn esperantistojn kiuj ne havas laboron

- por doni al ili vivrimedon kadre de disvastigado de Esperanto

KIE ?

ĝis nun la kandidatoj devenas el Afriko kie akiras la ekonomiaj problemoj

KIO ?

Esperanto Plus estas ilo kiu ebligas :

- disvastigi Esperanton
- ludi socian rolon pri senlima solidareco
- doni al ĉiu eblon agadi
- krei transversajn retojn

KIEL ?

- arigi homojn dekkvinope kiuj kotizas monsumon por sendi al la vigliganto

KIU ?

- la ideo devenas de Sunkompanioj en francio, kiuj, tra diversaj vojaĝoj en Afriko konstatis la realan malfacilaĵon de la vivo por ĉiuj, kaj inter alie por esperantistoj kiuj, kvankam spertaj, ne povas fruktigi sian konon.

D'OU VIENT ESPERANTO PLUS

Chers amis, (qui ont les mêmes idées)

Notre lien commun est notre belle langue Eo, n'est-ce pas?

Comme nous, certainement vous rencontrez de merveilleux espérantistes dans des pays émergents qui tout simplement ne peuvent pas se donner à l'espéranto en raison d'un manque de tout (travail, argent, nourriture...).

Nous en avons rencontré un, deux, trois... alors nous avons décidé de créer un outil qui n'est pas une simple aide, mais une reconnaissance digne et décente de la compétence d'un espérantiste expérimenté.

Il ouvre sur une collaboration entre des hommes (jusque maintenant en Europe) qui consentent de se rassembler par groupe de 15 en versant 10€ chaque mois pour soutenir un espérantiste.

Ainsi professionnalisé, le dynamique espérantiste gagne en légitimité vis à vis de ses soutiens, conforté dans son rôle, il peut pleinement dédier son énergie à la diffusion de l'Espéranto. Car il s'agit d'un échange, le candidat s'engage à écrire un rapport mensuel de son action à tous les membres de son groupe, et trimestriellement édite un journal du mouvement espérantiste dans son pays. Internet permet un échange rapide et riche entre tous les acteurs du projet et ainsi renforce les relations.

Espéranto Plus met en lumière le rôle social de l'Espéranto.

Esperanto Plus fait vivre l'Espéranto

Le projet d'ESPERANTO PLUS

directement en accord avec l'idée interne d'égalité et de solidarité dans l'humanité

POURQUOI?

Pour soutenir des espérantistes expérimentés qui n'ont pas de travail,

- * Pour leur donner les moyens de vivre dans le cadre de la diffusion de l'Espéranto

OÙ ?

Jusque maintenant les candidats proviennent d'Afrique où les problèmes économiques sont importants.

QUOI ?

Espéranto Plus est un outil qui permet :

- * diffuser l'Espéranto,
- * jouer un rôle social au sujet d'une solidarité sans frontière,
- * donner à chacun une possibilité d'agir,
- * créer des réseaux transversaux.

COMMENT ?

Rassembler des hommes par groupe de 15 qui cotisent une somme d'argent à envoyer à l'animateur.

QUI ?

L'idée vient des « Compagnies du soleil » en France, qui suite à divers voyages en Afrique ont constaté les difficultés réelles de la vie pour tous et entre autre pour les espérantistes qui quoique expérimentés ne peuvent valoriser leur connaissance.

Agado de niaj klubanoj....

KIUJ FUNKCIANTAJ GRUPOJ?

TOGOLANDO

Adjevi ADJE ekde julio 2012

MALAGASIO

Henriël FIDILALAO FIRAISSANA ekde januaro 2013

TANZANIO

Mramba SIMBA ekde januaro 2014

KONGOLANDO SUD-KIVUO

Jeremy KAHINDO ekde julio 2014

PROJEKTOJ

En diversaj afrikaj landoj kie jam Esperanto enradikiĝis
(Senegalo, Ganao, Benino, Eburua lando, Burkino...)

PRAKTIKAJ INFORMOJ

kontakto nin

Poŝtadreso : ESPERANTO plus

1 la place

09800 ARROUT

Tel : +33 (0) 5 61 96 82 08 ; +33 (0) 6 63 64 34 05

Retadreso : sekretario.esperanto.plus@gmail.com

Retejo : esperantoplus.jimdo.com

Anoj de ESPERANTO PLUS

prezidanto : Jean-Pierre Marcq ; sekretario : Alain Cazies ;

kasisto : Evelyne Rotellini

ESPERANTO PLUS estas oficiala asocio,

Eltiraĵo de la Oficiala Ĵurnalo : identiga numero :
w093001038 ; alperado : 29 de junio 2013

ALIĜILO

Nomo kaj antaŭnomo :

Poŝtadreso :

Tel :

Retadreso :

Sendu la pagon aldonota al tiu ĉi aliĝilo al ESPERANTO PLUS

Jarkotizo : 126 €

Pagomanieroj :

• Franca banka ĉeko

• Konto UEA UFE

• Giro al ĉi suba konto :

ASSOCIATION ESPERANTO PLUS

CA SUD-MEDITERRANEE

SAINT-GIRONS PLAISANT

IBAN : FR76.1710.6000.7605.9189.5200.089

BIC-Kodo SWIFT Kodo : AGRIFRPP871

QUELS GROUPES FONCTIONNENT ACTUELLEMENT?

TOGOLANDO

Adjevi ADJE depuis juillet 2012

MADAGASCAR

Henriël FIDILALAO FIRAISSANA depuis janvier 2013

TANZANIE

Mramba SIMBA depuis janvier 2014

RÉPUBLIQUE DÉMOCRATIQUE DU CONGO, SUD KIVU

Jérémy KAHINDO Depuis juillet 2014

PROJETS

Dans divers pays africains où déjà l'Espéranto est enraciné
(Sénégal, Gana, Bénin, Côte d'Ivoire, Burkina Faso...)

INFORMATIONS PRATIQUES

Nous contacter :

adresse postale : ESPERANTO Plus

1 la place

09800 ARROUT

TEL : +33(0) 5 61 96 82 08 ; +33 (0) 6 63 64 34 05

Courriel : sekreario.esperanto.plus@gmail.com

Site internet : esperantoplus.jimdo.com

Membres d'Espéranto Plus

président : Jean-Pierre Marcq ; secrétaire : Alain Cazies ;

trésorier : Evelyne Rotellini.

Espéranto Plus est une association officielle,

extrait du journal officiel : numéro d'identification :

w093001038 ; parution : le 29 juin 2013

BULLETIN D'ADHÉSION

Nom et prénom :

Adresse postale :

Tel :

adresse courriel :

envoyer l'inscription et l'argent à Esperanto Plus
cotisation annuelle 126€ (10€ par mois + adhésion à l'association)

possibilités de paiement :

*chèque de banque français

*compte UEA UFE

*virement au compte ci-dessous :

Association Esperanto Plus

Crédit Agricole Sud Méditerranée

Saint Girons Plaisant

IBAN : FR76.1710.6000.7605.9189.5200.089

Code BIC code SWIFT : AGRIFRPP871

Defio de Eo Vannes



DIMANĈON la 24-an de JANUARO 2016 en Vannes
ESPERANTO-VANNES defias la bretonajn klubojn... kaj aliajn Esperantistojn!



Esperanto-Vannes havas la grandan plezuron prezenti al vi la konkurson

ESPERANTISTOJ NEKREDEBLE TALENTUMAS!

- Celo: renkontiĝi, konkursi en vama etoso
- Senpaga konkurso
- Daviga enskribiĝo antaŭ la 25-a de Novembro 2015
- La kandidatoj povas esti unuopaj aŭ en grupo. Ili rajtas kunigi el malsamaj kluboj aŭ urboj. (Ne forgesu elpensi konkursonormon ;-). Se temas pri grupo, ĝi elektos la nombron de partoprenantoj por ĉiu fakto de la konkurso. Ni donos preferon al aliĝo de grupoj (se vi estas sola, vi povas peti de ni eblon kunigi aliulo(j)jn).
- La juĝantaro estos elektata surloke el la publiko
- Juĝkriterioj: humuro, originaleco kaj laŭfakte sinprezento, interpretado, gestado, kostumoj, konformeco al la temo (desegno)
- 4 faktoj en Esperanto: ĉiu teamo aŭ unuopulo elektos laŭvole unu aŭ pluraj el ili
 1. Kanto aŭ poemo (< 3 mn)
 2. Slikeĉo aŭ humura rakonto (< 5 mn, minimuma dekoro, seĝoj kaj tabloj disponeblaj)
 3. Laŭtema desegno (5 mn). La temo estos hazarde elektata lastmomente el proponoj de la publiko. La desegnaĵo estu servota. La grupoj elektos nur 1 aŭ 2 desegnantojn. Ili disponos blankajn tabulojn kaj kolorajn feltkrajonojn kaj desegnos samtempe antaŭ la publiko.
 4. Ludo kiu partoprenigas la publikon aŭ parton el ĝi (< 5 mn)
- Premioj: krom premioj laŭ la poentaro kaj en ĉiu fakto kaj en sumo, estos aliaj surprizoj!
 Ne timu, la klubanoj de Vannes partoprenos la faktojn, sed sen konkursi ;-)

*Pilaj kiarĝoj ĉe Esperanto-Vannes - 20 place Faram 56000 Vannes - contact@esperantovannes.fr
 aŭ Elisabeth Le Dru 06 21 07 11 00*



ESPERANTISTOJ NEKREDEBLE TALENTUMAS!

24-a de JANUARO 2016 en Vannes

ALIĜILO sendota antaŭ 25/11/2015 rete aŭ poŝte

Nome de Individuo aŭ respondeculo de la skipo

Esperanto-Vannes - 20 place Faram 56000 Vannes - contact@esperantovannes.fr

Nomo Konkursnomo

Kaze de grupo, pleksimuma nombro de membroj

Klubo (aŭ urbo)

Retadreso / telefonnumero

Celotaj faktoj: Kanto/Poemo Slikeĉo/Rakonto Desegno Ludo

Plouezec renkontoj 2014

LA 19AJ ESPERANTAJ RENKONTOJ : KIO NOVA en 2015?

Niaj 19aj Renkontiĝoj finiĝis. Kion novan ili alportis ?

Unue, staĝo iomete malpli vizitata ol kutime, ĉirkaŭ 70 partoprenantoj venis. Sed, nova okazaĵo tiun jaron, 14 infanoj, de 8 ĝis 14 jaraĝaj ĉeestis, kelkaj unuafoje, aliaj duafoje kaj Owen plurfoje.

Tiuj renkontiĝoj disvolviĝis laŭ la sama skemo kiel la antaŭaj, t.e :

matene, de la 9a ĝis la 12a : kursoj ; posttagmeze turismo kaj atelieroj kaj vesperaranĝoj post la vespermanĝo. Jen la instruista skipo :

- La geedzoj Battharai, niaj honoraj gastoj el Nepalo : Rajani plenumis la atelieron pri kuirarto, Narendra, ŝia edzo, gvidis la ununivelan kurson.
- Jean Luk Kristos, kun granda pedagogio gvidis la dunivelan kurson kaj la atelieron : " kanto".
- Nina Danylyuk, el Ukrainio, la babiladon.
- Zsofia Pataki, hungara junulino, kiu nun, kadre de civitema servo, deĵoras ĉe la asocio Armor Esperanto en "Saint Briec", instruis la infanojn.
- Larysa Osadchuck-Delmotte kreis origamiajn mirindaĵojn.
- Jérôme Care kaj Jean Claude Dubois filmis kaj muntis filmon pri la staĝo.
- Laurent Peuch teatrumigis la infanojn.
- Marie Savary ripozigis nin dank'al jogo.
- Amapola Triguero disprezentis la vastan libroservon elekton.

Ni ne forgesu la simpatiajn kaj dinamikajn bonvolemlon de la kuireja skipo, kiuj regalis nin dum la tuta semajno.

La busa promonado kondukis nin al "Plougrescant", kie ni vizitis la kapelon de Sankta Goneri kun ĝia kliniĝinta sonorilturo. Ravis nin ĝiaj internaj pentraĵoj, kiuj montras scenojn de la Nova kaj la Malnova Testamento. Poste, sur la marbordo "Côte des Ajoncs", ni miris pro la mara abismo "Le Gouffre", kiu, al ĉiuj imponas eĉ dum kvietita vetero. Pro manko de tempo, ni ne vizitis la belan urbon : "Tréguier".

Granda novaĵo tiun jaron : la orientiĝa kurado, proponita de Feliks al la infanoj.

Tiu ateliero ebligis la infanojn malkovri precizan irvojon uzante mapon, kompason kaj direktado-folion. La kurado disvolviĝis sur la dogano-pado n° 34, de la muelejo "Kraka" ĝis la pinto de "Bilfot", trapasante la havenon de "Port Lazo" kaj la "Kito"-ĝardenon. Laŭlonge de la irvojo, oni disŝutis signalo-skatolojn, kiuj entenis esperantajn demandojn. La ludo celis malkovri tiujn skatolojn kaj esperante respondi la demandojn (ĉiu skipo havis poŝvortaron).

Sub radia suno kaj granda kvietiĝo de Jeannine (avino de 9 el la partoprenantaj infanoj), 3 skipoj partoprenis la foriron, 3 la alvenadon, eĉ se iu el ili vojeraris survoje !

Jeanne. Pluezek.



Zamenhof en Vannes

Inaŭguro de la vojo Zamenhoff en Vannes : jen arikolo en la gazeto Vannes Mag



© FRANÇOIS LE DIVENAH

Élisabeth Le Dru, présidente de l'association Espéranto-Vannes a inauguré, le 13 juin dernier dans le quartier de Beaupré-Lalande, en présence du maire, David Robo, une allée portant le nom de Docteur Zamenhof, l'initiateur de l'espéranto. A l'heure où ce quartier s'apprête à inaugurer (le 26 septembre) une médiathèque municipale spécialisée dans les pratiques numériques, cette dénomination d'allée prend une valeur très symbolique puisque c'est en partie grâce à la généralisation de l'Internet un peu partout dans le monde que cette langue universelle a retrouvé ces dernières années un nouveau souffle.

Le Docteur Louis-Lazare Zamenhof (1859-1917), médecin ophtalmologiste polonais, a inventé l'espéranto en 1887. « Aujourd'hui, on le pratique dans le monde entier, explique Élisabeth Le Dru. C'est une langue vivante, reconnue par l'Unesco, qui est rapidement accessible à tous, précise, nuancée et adaptable aux évolutions des techniques. Pour Zamenhof, l'espéranto devait être une langue pont entre toutes les cultures, neutre et équitable. » « Notre association Espéranto-Vannes œuvre depuis 25 ans à la diffusion de l'espéranto par des cours, des stages, un spectacle annuel et aussi par l'accueil à Vannes d'espérantistes étrangers, comme, récemment, la conférencière uruguayenne Sonia Risso. » (présente à l'inauguration de l'allée Zamenhof le 13 juin dernier). Très prochainement, Espéranto-Vannes innovera en créant un « café polyglotte » au café A l'aise Breizh, au-dessus de la capitainerie du port, rive gauche. On y parlera italien, espagnol, allemand, chinois, breton... et bien entendu espéranto « Chacun choisira sa façon de s'exprimer pour la soirée ou picorera les langues d'une table à l'autre. »

► **Café polyglotte d'Espéranto-Vannes.** A partir d'octobre, tous les premiers jeudis du mois, à 18 h au café A l'aise Breizh, rive gauche (lieu et horaire à confirmer). Accès libre sous réserve d'une consommation. Renseignements: www.esperantovannes.fr

Farendaĵoj notindaj en via kalendaro 2015-2016

**Turneo
de ALEKSANDRO MELNIKOV
tra viaj kluboj
de la 23a de februaro ĝis 24a de marto
2016**



La 101-a Universala Kongreso de Esperanto

23a-30a de julio 2016

Nitra - Slovakio



La Sabatoj de Vannes

Datoj en 2015 - 2016

21/11/2015 05/03/2016

23/04/2016

Gresillon Kultur-Domo VENU POR AUTUNE 2015

De la 24a de oktobro ĝis la 1a de novembro

KIO OKAZOS EN 2016

Printempas

10a – 17a de aprilo

preparado al KER-ekzamenoj, ekzamenoj

Interkant'

20a-24a de aprilo

Someraj Semajnoj :

4a-15a de julio :

échanges de savoirs avec cours d'Eo (à confirmer)

29a de julio—20a de aŭgusto

Stages d'été

Pluezekaj Renkontiĝoj 2016

13a – 20a de aŭgusto aŭ

20a – 27a de aŭgusto ?

Por kompleta E-ista kalendaro

vizitu la retpaĝon

<http://www.eventoj.hu/2014.htm>